PRINCETON UNIVERSITY
RECEIVED
DEC 21 1920
THE LIBRARY

# AMERIKA ESPERANTISTO

**NOVEMBER, 1920**

UNIVERSITY LIBRARY
PRINCETON N.J.

OFFICIAL ORGAN OF
**THE ESPERANTO ASSOCIATION**
OF NORTH AMERICA

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. Miss G. Wehser, Secy. 2776 Bush St.

Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.
Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

WASHINGTON, D. C.
La Kabea Esperanta Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. P. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslov Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 413-5 E. Canfield Ave.

PORTLAND, ME.
Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

HEBRON, NEBRASKA.
La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun ĵaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

BUFFALO, N. Y.
Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

NEW YORK CITY, N. Y.
The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.
La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.
La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, inĝ., St. John Kanty College, eldonas monatan jurnalon, "La Studento," jara abono $1.00.

PHILADELPHIA, PA.
Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.
N. York Ave. 19

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

**WEST NEWTON, MASS.**

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

**A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.**

**Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.**

**One Dollar a Year.** **Single Copy Ten Cents.**
**Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.**

**Published Monthly by**
**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**
The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 27. November, 1920 No. 1

3 v in 1.
Apr. 2. 23. E. H. Faxon

### XII. Universala Kongreso de Esperanto, 1921.

EN PRAHA, ĈEĤOSLOVAKUJO

Laŭ la decido de la XIIa en Haag la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto okazos en Aŭgusto 1921 en Praha.

Ĉeĥoslovakaj geesperantistoj ĝoje salutante tiun ĉi decidon plezurege faros ĉion eblan por la plena sukceso de la manifestacio de Esperanto en la Ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĵus konstituiĝinta loka komitato jam komencis siajn preparajn laborojn esperante, ke ĝi trovos kunhelpon de la tutmonda esperantistaro por povi brile plenumi sian grandan honoran taskon.

Ni petas ĉiujn niajn geamikojn jam de nun fari ĉion necesan, por povi partopreni la XIIIan, kaj instigi la aliajn por kunesti. Disvastigu la konon pri la naturaj belaĵoj de la venonta kongresurbo Praha kaj Ĉeĥoslovakujo, kie la esperantista movado estas de longe tiel vigla.

Invitante Vin sincere en la belegan historian ĉefurbon de nia renovigita ŝtato ni esperas ke Vi grandnombre partoprenos la kongreson kaj estos kontentigitaj per nia'laboro.

Ĝis la revido en Praha!

Loka Kongresa Komitato.

I. SCIIGO:

La 29an de Septembro, 1920, en la komitata kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, Esperantista Klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan **lokan porkongresan komitaton:**

1920 12 v. 27-29
504067
Digitized by Google

Prezidanto:—Eiselt, eksgimnaziestro. Vicprez.: 1, Kraus, magistrata oficestro; 2, F-ino Ŝupichova, instruistino. Ĝenerala Sekretario: Pitlik, komercministeria komisario. Sekretariino: F-ino Dlouha, oficistino de ŝtataj fervojoj. Kasisto: Novak, horloĝisto. Por la "Verda Stelo" estis elektita Mudr Bischitzky.

Ĉiun **korespondadon** kaj **aliĝojn** oni sendu (por respondo respondkuponon aŭ afrankon en naciaj poŝtmarkoj) al **Augustin Pitlik, Praha III., Nerodova ul. 40.**

## A MODERN BABEL

One hundred and twenty delegates representing 41 nations, are in attendance on the first sessions of the Assembly of the League of Nations. But because of racial cousinship, only 12 languages are used in the intercourse of the delegates.

Twelve different tongues are, however, quite enough to cause confusion, if there shall be as much difficulty in all the cross-interpretation as there was in translating President Wilson's address to the Rumanians and their fellow Balkans from English into French and back again.

Acording to the old Babylonian tradition, handed down to Christendom through the book of Genesis, the diversification of tongues and peoples had its origin in miraculous intervention to prevent the pursuit of a folly in the attempted building of a tower to reach to heaven.

Perhaps the lack of a common tongue, which is typical of the broader differentiation in habit and thought, as well as of condition, of the scattered nations, may prove as serious an obstacle to the twentieth century hope of attaining the millenium, as it was in the Babel of the myth.

—from the Philadelphia Bulletin.

## AN EXCELLENT ESPERANTO TEST

The following words constitute part of the famous test of Prof. Lewis M. Terman, of Stanford University, Calif., for determining the extent of the average person's vocabulary. The entire test consists of 100 words selected at random from the dictionary, one out of every 180 words; the definitions are required. If 20 words are correctly defined, the individual is considered to have a working vocabulary of 3600 words—20x180; the average adult it is claimed should be able to define 65 words out of the 100, showing a vocabulary of 11,700 words; while a being of superior intelligence may get 75 words correctly with a corresponding vocabulary demonstrated of 13,500 words. Prof. Terman is extremely pessimistic that the entire 100 could be defined correctly.

Digitized by Google

For the Esperanto student it would be interesting to place opposite the English word its Esperanto equivalent, making it a double test, as, if one is able to place the Esperanto word there, it is clear evidence that the definition is known.

Send us in the results of your test. We would like to know who has the greatest Esperanto vocabulary in this country. Ye Editor is barred,—he is elected judge,—that gives us all a fair chance.

—I. M. H.

**The Test**

orange
bonfire
tap
scorch
envelop
straw
rule
eye-lash
health
copper
curse
impolite
pork
mellow
afloat
guitar
haste
reception
treasury
civil
quake
muzzle
noticeable
southern
dungeon
lecture
outward
plumbing
depredation
gelatinous
puddle
gown
roar
embody

swaddle
priceless
artless
avarice
conscientious
charter
dilapidated
disproportionate
bewail
mosaic
coinage
peculiarity
forfeit
shrewd
repose
Mars
hysterics
sportive
apish
snip
brunette
majesty
juggler
crunch
nerve
regard
stave
insure
misuse
skill
ramble
promontory
instinctive

complot
limpet
shagreen
cameo
homunculus
parterre
sudorific
piscatorial
theosophy
perfunctory
paleology
casuistry
ambergris
achromatic
retroactive
sapient
selectman
incrustation
laity
ochre
fen
fluent
declivity
infuse
accredited
harpy
drabble
lotus
irony
philanthropy
milksop
frustrate
exaltation

---

Jes—diris la juna edzino, fiere—la patro ĉiam donacas ion multekostan kiam li faras donacon. Tion mi sciiĝis—respondis la edzo—de kiam li vin donis al mi.

Digitized by Google

## Esperantista Akademio

### Du Konsiloj al la Esperantistoj

Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, la Akademio havas nek la rajton, nek la povon, trudi aŭ malpermesi ion, sed la rajton ĝi havas kaj la devon, doni konsilojn.

1e. La Akademio konsilas—krom en okazo de absoluta neceso—, uzi nur tiujn prefiksojn, radikojn kaj sufiksojn, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro kaj en ĝiaj Oficialaj Aldonoj (Vidu **Oficiala Gazeto**[-n]).

Ĝi cetere nun preparas trian aldonon al la Komuna Vortaro kaj organizos prilaboradon de teknikaj vortaroj kun helpo kaj kunlaborado de spertaj Esperantistoj kompetentaj en ĉiu teknika fako.

2e. Aparte **pri landnomoj ĝi insiste** kaj **forte** konsilas, precipe al la gazetoj, sed ankaŭ ĝenerale al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa, por konservi la unuecon da nia lingvo, uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon **ujo**: Turkujo, Rusujo, Germanujo ktp.

La Akademio memorigas, ke jam en la jaro 1909 ĝi **oficiale** voĉdonis **kontraŭ** la sufikso **i** por landnomoj. La rezultaton de tiu voĉdono ĝi publikigis en **Oficiala Gazeto,** 25. Aprilo 1910, p. 326.

Akcepto de la sufikso **i** por landnomoj ne sole estus grava ŝanĝo en nia Fundamento, sed ankaŭ signifus plenan disfalon de la tuta Esperanta sistemo, en kiu la vorto **Turkio,** ekzemple, nur povas havi la sencon **Turk-io,** nome io turka aŭ **turkaĵo,** tute same kiel **bon-faro** signifas **faro bona.** La vorto **io** jam ekzistas en Esperanto kiel memstara vorto, kun la senco **quelque chose, etwas, anything,** kaj ĉar, laŭ klarigoj de D-ro Zamenhof mem (Fundamenta Krestomatio, p. 249; Lingvaj Respondoj (dua serio) p. 30; Oficiala Gazeto, 25. Aprilo 1910, p. 324), ankaŭ prefiksoj, sufiksoj kaj gramatikaj finiĝoj efektive estas en nia lingvo nur memstaraj vortoj, tute similaj al la ceteraj, tial al la vorto **io** ni ne povas nun doni la sencon **lando.**

P. S.—Laŭ apliko de la artikolo VII. 2 de la regularo, la Akademio decidis, ke s-ro **de Saussure** ne plu estas membro de la Akademio, nek de la Lingva Komitato.

[Frapanta ekzemplo de la efiko de tiaj konsiloj, ni aprobas, sed de kiu la Akademio havas rajton regi la membrecon de la Lingva Komitato?]

Malfacilanime ni enmetas en A. E. la ĉi-supran anoncon. Kiam unue ni ricevis la konsilojn ni iom prokrastis, sed kial ni lastatempe ricevis ankaŭ alian (presitan) leteron "kiel privata komunikaĵo," ni devas ne plu prokrasti. Kompreneble redaktoroj ne posedas ĉiun presitan dokumenton; eble ofte eraras—[Ĉiujn jarraportojn de la Lingva Komitato mi mem zorge tralegis pri la **io-ujo** kaj rilataj aferoj, kaj ĝis nun mi opinias la resumon citantan de Dec. 1919 tute ĵusta]—sed eĉ redaktoroj povas ekkoni iom barakteman kaj oligarĥian sintenadon je tiu demando kiu faras ĝin danĝera. Por paco A. E. mem estus tute preta akordigi sin al la malfruaj konsiloj, sed nun la plimulto ne ŝajnas tiom preta. Pro tio A. E. ne nun malpermesas la uzadon de **io** por landnomoj. Jen la teksto de nia **ne-privata** respondo al la Akademio, aŭ pli prave al la Centra Oficejo en Parizo.

Estimataj Sinjoroj:—

Ni per tio sciigas nian ricevon de via lastatempa komunikaĵo. La afero de **ujo-io** ŝajne tute ne trankviliĝas, kaj el la du apartaj partioj neniu ŝajne volas cedi. Pro tio, mi kuraĝas ree sugestii, ĉi tiam rekte al Lingva Komitato, kompromizon, kiu eble povas malakrigi la diskuton.

Tie kie troviĝas en la Fundamento 4-foje, pp. 24, 31, 47, 52, "**ujo,**" ĉiufoje estas nedistingita la signifo, ĉu regnata aŭ ĉu hejma lando.

Digitized by Google

Ekzemple: Turkujo: Turkey—Ĉu tiu ĉi landnomo enhavas Armenujon aŭ ne? Ĉu dum la 18a jarcento Grekujo ekzistis aparte aŭ estis nur parto de Turkujo?—Sendube, ĝis lastatempe la signifo **interkonsentita** por **-ujo** restis tiom larĝa, sed ĉu ni necese devas akordiĝi al nuancoj de la normo aŭ nur al la normlitero mem (se fakte, kion ni ne kredas, oni limigis la evolupovon de Esperanto per tiu normo).

Tamen, ni ne deziras tro taksi la argumenton, la notinda fakto estas ke, por konservi la unuecon de la movado, estas necese ke oni forigu la diskutadon kaj trovi komunan vojon sufiĉe larĝan por ke ĉiu partiano povu uzadi kiun formon plaĉas al li. Tiu vojo, ŝajnas al mi, troviĝus facile ĉitiamaniere (kaj eble aliamaniere).
-"io" signifu regno, landa apartenaĵo, de la nomita raso (dependa aŭ sendependa) simile al la uzado ĉe **filosofo, filosofio; geologo, geologio; franco, francio.**

La strangan argumenton pri memstaraj silaboj, ni lasu al la humoremaj, nur sugestiante kelkajn ekzemplerojn: **har-mon-io; dis-en-ter-io,** k. t. p.

-"**ujo**" signifu hejmloko kie troviĝas, naskiĝas, ktp., la nomita raso (raso laŭ moro kaj lingvo distingita), simile al arba ujo—**pomujo,** ktp.

Ekzempleroj:

Kie troviĝis Hebreio antaŭ la milito? nenie, sed nun en Palestino.

Kie troviĝis Hebreujo antaŭ la milito? en multaj grandaj urboj diverslandaj troviĝis hebreejoj apartaj; Novjorko estis la plej granda hebreujo en la mondo, sed tie hebreoj ne loĝis en apartaj hebreejoj. Nuntempe oni restarigas la antikvan Hebreujon.

Britio estos nomo de unu landa apartenaĵo de la angloj, tielnomitaj "britoj."

Britujo estos nomo de loko kie (antikve) la "britoj" mem havis sian hejmon.

Italoj kaj rusoj kiuj loĝadas en Parizo estas Francujanoj, tamen se ili ne ŝanĝas la civitanecon, ili ne estas Francianoj, sed fremdoj. Se ili loĝas en Korsiko ĉu li estas Francujanoj aŭ Italujanoj? Se belgo loĝis antaŭ la milito en Alsacio ĉu li estis Germanujano? Ĉu albano loĝas en Fiume!—![Politika afero, ĉu ne?]

—Dum la dinastio de Thuth-Moseo la imperio egipta estis tre granda. Egiptio enhavis tiam multajn landojn ekster Egiptujo. Fenikujo kaj Sirio konis la superregadon de la faraonoj, Nubio estis gubernio de Egiptio, la Ĥetojn kaj Mitanojn oni ripete venkis. Egiptio estis militema kaj komerca; al la popoloj trans la maro ĝi sendis alfabeton kaj bronzajn mortigilojn. En Ĥetujon enmigris novaj rasoj—

Egiptio=egipt(a imper)io= {
Egiptujo kaj
Hebreujo, [se ekzistas gubernio aŭ regno Hebreio ankaŭ.] kaj
Fenikujo [se ekzistas gubernio aŭ regno, Fenikio ankaŭ.]
}

Digitized by Google

Se oni ne ŝatus unu formon, li povus uzadi la alian en preskaŭ ĉiu okazo sen grava difekto al la signifo. Tiamaniere oni povus satigi anojn de ambaŭ partioj.

. . . . . . . .

Sed bedaŭrinde restas la fundamenta afero de la aŭtoritato de centraj institucioj.

Pardonu, ni petas, ke ni ne komprenas kial aŭ kiel Parizo, aŭ la Akademio, esperas ke ĉiu redakcio nun renverssaltos laŭ ĝia peto. Ni redakcioj kaj la Esperantistaro mem, atendis, ŝajnas al ni, iom longatempe por oficiala klarigo de tiu afero, kaj ne povis ĝui 5-jaran dormadon. Ĉu ni ne povas esperi ke la Akademio, kiu ricevis sian povon kaj devon **por rapida agado** dum krizo, donu la aferon al la Lingva Komitato, al kiu ĝi rajte apartenas, anstataŭ provi tiom malfrue perforte subteni la ne tute kompreneblan baraktemon de la C. O. E. ĵus antaŭ ol oni proponas ŝanĝojn en niaj fundamentaj rilatoj. Se oni juste informis nin, la anoj de la L. K. kiuj troviĝis ĉe la nerajtigita Haga kongreso plimulte aprobis almenaŭ la permesan uzadon de io. En la nuntempa situacio, kiam dum 6 jaroj kaj pli la centraj Esperantistaj institucioj estas ĝuintaj senbridan aŭtoritaton, pro la manko de komunikado inter Lingva-Komitatanoj, pro la neefektivigado de la Internacia Unuiĝo, kaj pro la detenado de rajto de la kongreso en Hago [Mi ne ricevis ian antaŭsciigon, publikan aŭ privatan, pri tiu senrajteco de la kongreso, ĝis, la monon elspezitan, mi alvenis al Hago], kaj nun kiam estas proponite reorganizi la fundamentajn rilatojn, tiu agado eble ŝajnos aŭtokrata kaj nur vekigos ribeladon.

Se ni prave komprenas la sintenadon de D-ro Zamenhof pri tiaj aferoj, apartenas al la Esperantistaro mem provadi, ne amase, ne subite, sed iom post iom, neologismojn, same kiel en la angla lingvo dum la lastaj jaroj oni komencis ŝanĝadi la literadon de cortaj vortoj; ekz.: though, tho; through, thru; thorough, thoro, ktp. Spite tion, ni multe deziras ke la Lingva Komitato, kiu enhavas la multlandajn spertulojn, efektive gvidu la evoluon. Ni esperas ke ili klare ricevos rajton malŝtonigi la lingvon. Ni tute konsentas ke la aŭtoritateco en lingvaj aferoj apartenas al la Lingva Komitato kaj per ĝi al la Akademio; ni deziras ne fortranĉi sed vigligi tiun aŭtoritatecon; ni deziras ricevi ĝian gvidadon. Ni tute ne deziras morti antaŭ ol la L. K. agas pri la radikoj, ktp., proponitaj de la subkomitatoj (krom tiu pri propraj nomoj), kaj troveblaj en Verax.

Ni tute malkonsentas ke redakcio de iu ajn gazeto aŭ asocio havas la rajton forpreni tiun gvidecon de la L. K. Tio ŝajnus al ni anarkia, tamen egale oligarĥia kaj anarĥiiga ŝajnas la retenado de ĉiu povo en la manoj de kelkaj ĉefoj, kiuj ŝajne ne komprenas la neceson de demokrata malkaŝiteco por repacigi **niajn** internaciajn rilatojn.

Redakcio havas devon konsideri tiujn konsilojn, ankaŭ redakcio havas alian devon, aŭskulti kaj demokrate reprezenti la dezirojn de la Esperantistaro.

Samideane la via, Norman W. Frost.

---

Kiam estas religio samtempe elokventa kaj progresema?
Kiam ĝi estas piediranta.

Digitized by Google

## CERBUMEJO III.

Ĉar kelkaj samideanoj elmontris intereson en tiu ĉi studado ŝajnas ke la fako estas daŭriginda ĝis "plua avizo." Tial sekvas ĉi-sube tradukotaj vortoj kaj esprimoj No. 11—20. Kompreneble la publikigado de la tradukoj estos prokrastata ĝis la januara A. E., por ke oni havu sufiĉe da tempo por alvenigi la proponojn de "ĉie." La pripensotaĵoj estas en la angla lingvo:

11. La vetero estas **diabolical.**
12. La vetero fariĝis pluva kaj **in turn** sunbrila.
13. Li **rimarked** ke vi forestis hieraŭ.
14. Kiam oni voĉdonis via propono estis **turned down.**
15. Bonvolu prezenti vian peton **in writing.**
16. Post longa diskutaado la propono estis **put to vote.**
17. Tiu propono **of yours** estas tre bona.
18. Tio estas kruda specimeno de kio ni proponas **manufacture.**
19. Mi ne havas **any** deziron **whatsoever** por tiu libro.
20. Oni ne ĉiam vidas tre klaran **distinction** inter la signifojn de "da" kaj "de."

Mi mem volus demandi el ĉiu samideano kiu havas la faktojn, de kie Dro. Zamenhof elvenigis la principon de la predikata nominativo post la akuzativo, ekz., en la frazo, "Ŝi nomis sian filinon Mario," kiu havas alian signifon ol "Ŝi nomis sian filinon Marion"? Ĉaar ofte mi diras, propagande, ke Dro. Zamenhof bazis la lingvon en ĉiu principo sur io antaŭe ekzistanta en moderna aŭ antikva lingvo.

---

## ESPERANTO AND PHILATELY

That champion of philatelic Esperanto, Dr. G. Jameson Johnston, writing from Dublin, September 18th, says:—

"In the current number of "Stamp Collecting" you quote from 'Yuraku' that Esperanto is of little or no use in stamp collecting, as serious collectors, in order to master the stamps they are collecting, widen their knowledge by reading philatelic journals and literature mostly written in national languages. In my opinion, the exact opposite is the case. The quotation is from a Japanese philatelic journal. How many philatelists read Japanese? Before the war I corresponded regularly with Russian, Swedish, Czech, Danish, Polish, Belgian, Spanish, Hungarian, and other philatelists. Do many philatelists read these national languages? Since the war I have resumed with Russia, Sweden, Czecho-Slovakia, and Belgium, and have obtained valuable information as to the issues and varieties of the stamps of these countries. As an example, let me draw your attention to a slight change in the 1920 addition of the current 2, 5, and 15c. Belgian, small issue. This is only one of very many valuable hints I have obtained through Esperanto."

from "McKeel's Weekly Stamp News"

Digitized by Google

## GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

## LA SIEĜO DE SEBASTOPOL

—Kuŝiĝu!—ekkriis ies voĉo

Miĥailov kaj Praskuĥin kuŝiĝis teren. Praskuĥin, ferminte okulojn, nur aŭdis, kiel la bombo ekbatiĝis je malmola tero ie tre proksime. Pasis unu sekundo, kiu ŝajnis horo,—la bombo ne eksplodis. Praskuĥin ektimis: ĉu ne vane li malkuraĝiĝis: eble, la bombo falis malproksime. Li malfermis okulojn kaj ekvidis kun plezuro, ke Miĥailov kuŝis tere senmove apud liaj piedoj. Sed kiam li levis la kapon, li ekvidis la turniĝantan bombon unu metron de li.

Teruro ĉirkaŭprenis lin. Li fermis vizaĝon per manoj.

Pasis ankoraŭ unu sekundo—sekundo, dum kiu li trameditis multon, multon kaj dum kiu li rememoris tutan sian antaŭan vivon, ĉiujn siajn esperojn.

"Kiun ĝi mortigos,—min aŭ Miĥailov'on aŭ ambaŭ kune? Kaj se min, kien? Se kapon, tiam ĉio estas finita; kaj se piedon, tiam oni amputos, kaj mi povas ankoraŭ resti viva. Kaj eble ĝi mortigos nur Miĥailov'on: tiam mi rakontados, kiel ni iris kune, kaj ĝi lin mortigis kaj min nur ŝprucmakulis per sango.... Ne, ĝi estas al mi pli proksima! Cetere, eble ĝi ne eksplodos,"—li pensis kaj volis malfermi okulojn. Sed tiun ĉi tempon, ankoraŭ tra fermitaj palpebroj, li ekvidis ruĝan fajron kaj io kun terura krako ekpuŝis lin en mezon de la brusto; li salte leviĝis, ekkuris ien, surpuŝiĝis sur ian sabron kaj falis flanken.

"Dank' al Dio! mi estas nur kontuzita," li pensis kaj li volis tuŝi bruston per manoj, sed liaj manoj ŝajnis alligitaj, kaj iaj kunpremiloj premis la kapon. Li volis ekkrii, ke li estas kontuzita, sed lia buŝo estis tiel seka, ke la lango algluiĝis al la palato. Li terure volis trinki. Li sentis, kiel malseka estas ĉe li en la brusto. "Certe, mi sangebatiĝis, kiam mi falis," li pensis. Al li fariĝis ĉiam pli terure, li kolektis ĉiujn siajn fortojn kaj volis ekkrii: "Prenu min!" Sed anstataŭ tio ĉi li ekĝemis tiel terure, ke al li mem estis terure aŭdi sin. Li ekpenis, rektiĝis kaj jam plu ne vidis, ne aŭdis, ne pensis kaj ne komprenis. Li estis mortigita sur loko per disrompaĵo je mezo de la brusto.

---

### Notes

This notable work of Tolstoy's is one of many translations by Kabanov and others. The great works of this great Russian idealist and friend of Esperanto have been translated into many tongues, but never, we think, appear with more force than Esperanto gives them. Tolstoj is here trying to expose the truth about war.

Kuŝiĝis **tereN**: (Perhaps we should have translated "fell to the ground," but without an **ek** it seemed too wide a translation)—Compare **kuŝis tere.** Malfermis okulojn—we insert "the" in many cases; as the definite article does not exist in Russian it is often missing in translations. **Li fermis vizaĝon**: literally he closed his face, or perhaps, "he shut out the sight." **Mikhailov'on**:—notice the **'on** accusa-

Digitized by Google

## FOR THE STUDENT

## THE SIEGE OF SEBASTOPOL

Lie down! — cried somebody's voice.

Mikhailov and Praskuchin lay down upon the ground. Praskuchin, closing his eyes, only heard the bomb as it struck the hard earth somewhere very near. One second passed, it semed an hour,—the bomb did not explode. Praskuchin felt afraid, but hadn't he lost his courage for nothing. Perhaps the bomb had fallen at a distance. He unclosed his eyes and saw with pleaasure that Mikhailov lay without moving on the ground by his feet. But when he raised his head, he saw that whirling bomb a meter away.

Terror came upon him. He covered his face with his hands.

Another second passed, a second during which he meditated much and during which he recalled all his past life, all his hopes.

"Whom will it kill — me or Mikhailov or both together? And if me, whereabouts will it strike me? If in the head, then all is over; and if in a foot, then that will be amputated and I can still live. Or perhaps it will only kill Mikhailov; then I shall have the story to tell of how we were together, and it killed him but only bespattered me with his blood. ....No, it is closer to me. And then too, may be it wont explode," —he thought and wanted to unclose his eyes. But this time, still thru closed lids, he caught sight of a red flare and with a frightful crack something struck him in the very breast; he sprang up, started to run wildly, rushed upon some sword and fell to one side.

"Thank God! I'm only bruised," he thought and he tried to touch his breast with his hands, but it felt as if his hands were tied and a vice gripped his head. He tried to cry out that he was hurt, but his mouth was so dry that his tongue was glued to his palate. He was terribly thirsty. He felt how wet he was, his breast . "Surely I must have got some blood over me when I fell," he thought. He grew more and more frightened all the time; he collected all his strength and tried to cry out: "Come and get me!" But instead of that he groaned so dreadfully that it sounded frightful, even to himself. He writhed, straightened out, and could now see, hear, think, and understand no more. He had been killed on the spot by the explosion at the middle of his breast.

---

tive ending; the tendency today is rather to treat names without an **o** ending as invariable. **kien**:—upon that part whither the shell is going, **kie** would have meant "where would I be when hit." **Ekpuŝis**: —"shoved" might be preferred. **Ien**:—"any way at all," hence "wildly." **Volis**:—used again and again to express a meaning between **provis** and **penis**; **provis** implying a test rather than a wish and **penis** a severe physical straining. **La langon**:—note here that **la** is used instead of a possessive pronoun as the sense is clear. **Sangebatiĝis**:—does not identify the blood as his own or as someone else's. "**Prenu min**":—"Come and get;" is this better than "take"? **Al li estis terure aŭdi sin**:—**aŭdi sin** is here the subject of **estis**, why then **siN** and **terurE**?

Digitized by Google

[We are happy to be able to herafter present our "gems" in a real setting, for Mr. H. M. Scott, our co-editor, who understands grammar and has few equals in his knowledge of Esperanto literature will be once more in charge of this department. We beg indulgence for the imitation here presented..]

---

## ESPERANTA PAROLEJO

**In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required**
**En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj**

[The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the facts are on the authority of the person named. **Not** open for any articles upon Esperanto subjects proper.]

---

## ESPERANTAJ KURACISTOJ

Mi intencas fondi anstataŭ la ĉesinta "Voĉo de Kuracistoj" novan revuon sub la titolo "Iternacia Medicina Revuo." En ĉiuj medicinaj centroj de la mondo ni bezonas kunlaborantojn, kiuj sendus regule raportojn tradukitajn el la nacilingvaj medicinaj gazetoj. Tielmaniere nia revuo prezentus ĉiam plej bone la staton de la progreso medicina sur la tuta mondo. Por kiel eble plej baldaŭ realigi ĉi tiun aferon, ni petas urĝe ĉiujn kolegojn, kiuj deziras subteni per abono la revuon, sciigi min pri ilia intenco per simpla poŝtkarto, ke mi proksimume sciu la nombron de la estontaj abonantoj. Se mi ricevos la necesan nombron de ĉi tiuj provizoraj aliĝoj, mi povos montri al la eldonisto la garantion de la entrepreno. La prezo de unu numero, se ni fiksus ĝin por 4 Hungaraj kronoj, kostus por la eksterlandaj kolegoj tre malmulte, ekzemple: por Svisaj 10 centimojn, por Francaj 25 centimojn, por Amerikanaj 2 cendojn, ktp.

Mi petas do ĉiujn kolegojn, kiel eble plej baldaŭ sendi al mi ĉi tiujn kartojn.

D-ro Karlo Mezei,
VI., Terez-korut 4, Budapest, Hungario.

. . . . . . .

**Liberiga Stelo al la Internaciistoj!**

Kiu volas rapidigi la triumfon de Esperanto en la laboristaro; enirigi lumon kaj sanan spiriton en la esperanta movado; helpi la eldonadon de literaturo internaciece kuniga; unuvorte labori je la kreado de sennacieca—ununacia—popolo, tiu senprokraste aniĝu al "L. S." kaj abonu ĝian oficialan organon: **Esperantista Laboristo.**

Statutoj kaj provnumero estas riceveblaj interŝange de 1 stampita respondkupono (aŭ alio samvalora) adresota: 23 rue Boyer, Paris XXe.

Liberiga Stelo
internacia asocio de antaŭemaj esperantistoj,
23 rue Boyer, Paris XXe,

---

"La Esperanta Lingvisto." S-ro Stefano La Colla el Palermo, Via Felice Cavalloto 1, (Sicilia) intencas eldoni sub tiu ĉi titolo gazeton, kiu okupus sin sole per lingvaj demandoj, se almenaŭ 1000 samideanoj abonos.

Digitized by Google

## KRONIKO

**Boone, Iowa**—Post Dec. 17, 1920, S-ro C. H. Gibbons dejoros ĉe la Biblical College kaj Associated Institutions ĉi tie. Li prizorgos Esperanton.

**Worcester, Mass.**—Nia vicprezidanto, S-ro W. E. Baff, kiu dum multaj jaroj kondukis oficejon en Washington, D. C., kaj speciale traktas por klientoj kiuj deziras konsilon pri elpensaĵoj, (fremdaj kaj enlandaj aferoj), antaŭnelonge revenis ĉe ni (Worcester County Esp. Soc.), kaj bonvenas ĉiujn vizitantajn Esperantistojn ĉe 311 Main Str. Nia spirito nevelkas. Oni starigus du klasojn, estonte, unu por Bahaianoj, unu por "Skandinavia Studie Klubo—Odiorne Gleason, sek.

**Topeka, Kans.**—Esperanto Lundo Klubo, pli ol 30 anoj, studis Esperanton ĉiusemajne dum la somero. —Boy Scout Trail.

**New York, N. Y.**—La lasta barĉo de la Harmonio okazis la 12an de Nov. Ĉeestis 50 personoj, antaŭ kiuj la prezidanto, S-ro J. J. Sussmuth, raportadis pri siaj spertoj ĉe la internacia Esperantista Kongreso en Hago. La raporto daŭris unu horon, kaj ĉiu atente aŭskultis ĝisfine kun grandanima aplaŭdo. S-ro Carter deklamis, S-ino Sorensen kantis solon kaj la Harmonia ĥoro kantis kelkajn kantojn. Post la 11a horo sekvis amuziga dancado ĝis la meznokto, al kontentiĝo de la geĉeestantoj.

La proksima Barĉo, kiu estos Memorbarĉo por la Majstro, okazos vendredon, la 10an de Dec., je la 7a vespere ĉe la Little Roumanian Casino, 120 Second Ave.—Ĉiu Esperantisto en kaj ĉirkaŭ Nov Jorko, estas invitata ĉeesti tiun ĉi memorbarĉon, ĉar per ĝi ni preparas la kantojn, ktp., por la Memorfesto, okazonta la 15an de Dec., en la Geneological Hall, aranĝota de la New York Esperanto Society, apogata de la Harmonio.

Klasoj funkciantaj en New York estas nuntempe:

Washington Irving High School (Irving Place kaj 17a strato)—ĉiun mardon vespere je la 8a.

Public School No. 40.—nur por Rusoj—Ĉiun lundon vespere je la 7a, ĉambro no. 408.

Rand School of Social Science, 7 East 15th St.—ĉiun mardon vespere je la 8a kaj ĉiun sabaton posttagmeze je la 3a.

Russian Technical Aid School, 24! East 23rd St.—ĉiun mardon vespere je la 7a, kaj ĉiun dimanĉon je la 10a matene.

Emanuel Church, Rainbow Circle—Por Bahaanoj—105 West 130th St.—ĉiun ĵaŭdon vespere inter la 7a kaj la 8a.

Privata lernejo ĉe F-ino D. C. Lincoln, 974 St. Marks Ave., Brooklyn —ĉiun lundon vespere je la 8a.

Aliaj klasoj povas esti formitaj per la helpo de la Harmonio, kies konstanta adreso estas: 1 W. 34th St.

La Metropolitan Esperanto Klubo ankaŭ vigle laboras por la propagandigo de la lingvo, kaj estas nur pro tiu klubo, ke oni sukcese enkondukis Esperanton ĉe la Rand School of Social Science, kun bona sekvantaro.

Digitized by Google

Philadelphia, Pa.—Dum la lastaj monatoj la Esperanto Stelo de Polujo propagandas la Esperanton kun helpo de broŝuroj eldonitaj de ni pri historio de Esp. kaj ĝia valoro. —S. Zysk, sek.

**Erie, Pa.**—Dum la pasinta libertempo ola Studenta Societanoj sukcesis interesigi pri Esperanto ĉirkaŭ 15 personojn. S-ro Paŭlo Palka, kiu estis prezidanto de la P. S. S. en pasinta jaro forveturis al Krakovio. Polujo, por studado de Teologio. Li sukcesis interesigi multajn kameradojn pri Esp. Prof. Eugene Bobrowski, C. E.

**Hebron, Neb.**—La leĝo nuntempe malpermesas uzaadon de iu lingvo krom la angla en ia lernejo, publika, privata, aŭ eklezia. Pro tio nia Sabata klaso en la Esperanta Nova Testamento ne povas nun funkcii.

**Redwood City, Cal.**—Korajn salutojn al Ges-roj George Petersen, Redwood City pri la alveno de Sinjoreto George W. Petersen, La Dua, en ilian hejmon, Okt. la 19an, 1920. Ni esperas ke la Junulo iĝos tiel lerta Esperantisto kiel lia patro.

**Montreal, Can.**—Nia grupo kunvenas ĉiun mardon kaj ĵaŭdon je 8.15. Ni havas ĉirkaŭe 20 studentojn. La klaso de mardo estas por la progresintoj, kaj la klason de ĵaŭdo por komenculoj.
**Baltimore, Md.**—La grava Polalingva gazeto, "Poster," aperigas Esperantan fakon zorgata de S-ro A. Bartoscz.

**Costa Rica**—La Esperanto movado reviviĝas en San Jose kaj Heredia. [Ni esperas ricevi pluajn detalojn. A. E.]

## KLIPLINGS

**The U. E. A. headquarters and the magazine "Esperanto" are in new headquarters, Geneva, 12, Bd. du Theatre, Svisio.**

Marseilles, France—The Intersindikata Grupo Esperantista reports that, thanks to Comrade Moreno (Maurin), U. E. A. del., the Esperantist movement in Marseilles, especially at the Labor-Exchange, has made great progress. The young "Intersindikata Grupo Esperantista" is now growing larger and stronger. The Committee on Trade Courses of the Labor-Exchange has given moral and financial support to the Esperanto courses which are on the same footing as the trade courses. —Chautard, Sec., I. G. E.

Pleven, Bulgaria—2 courses with 80 members. Esperanto especially strong among students of the female "gimnazio."
Bulgara Esp.

Suomen Postimerkkilethi, the only Finnish philatelist organ, carries also information department in Esperanto, Editor Olla Terasvuor, Porvoo, Suomio, Finnlando.

Milan, Italy—Great activity in Esperanto among socialist and labor circles thruout the Po Valley; 200 workingmen in Milan, 150 in Genoa attending.—Bulteno de la Esperanta Grupo, Torino, Mario Muretti, Via G. Galliari, 31, Torino, Italy.

The Danzig Esperanto Ass'n has some 100 members; much newspaper propaganda. —Germana Esp.

Digitized by Google

At Reichenberg, Aug. 20, a samideano from Usona told his experiences with Esperanto. —Germana E.

Athens, Greece—A course in a trade school here. Another begun among Bulgarian prisoners of war.

Lodz, Germany—Regular articles in Neue Lodzer Zeitung.

Catalonia—Many guest-children from Graz, Austria, for the families of samideanoj here were held up by the disturbances in North Italy. —Monata Bul. Aplech

Many of our samideanoj who live in Nebraska, Iowa, etc., may be interested in Esperantzky Zpravodaj, a propaganda periodical foi Cheko-Slovaks which has just begun publication.

La Esperantisto of Vienna, Austria, for July-Aug. contains a review of Upton Sinclair's "Jimmy Higgins."

Barcelona, Spain—A course for beginners at the "Paco kaj Amo" Club starting May 7 with 65 students was lately completed by 42 graduates. Le Monde Esperantiste.

One of the noteworthy resolutions taken by the VIth International Catholic Esperanto Congress at the Hague was the plan for an Esperanto religious drama, "La Savo de l' Mondo," to occur during their next congress in Graz, Austria.

The name "Internacio Katolika," "Ika," was chosen to replace the old I. K. U. E. and a central letter exchange put in charge of Mr. Hans Sappl, Isabellastr. 40, Munchen, Germany. —Germana Esp.

Railway Esperantists are requested to get in touch with those
erstr. 19, Breslau, Germany.
of other nations by addressing Georg Habellok, Br. 10, Schleiermach-

The firm of Baring and Gribel, Dresden, Germany, have just issued their catalog in Esperanto.

Oederan, Germany—With the backing of the burgomaster there are in operation 2 courses for (75) children and 1 for (37) grown-ups,

The 7th annual congress of Japanese Esperantists was held in Tokio Oct. 1—3. Pastor Inocento Serishev, formerly a leading member of the Siberian Union of Cooperatives at Tomsk, is making a journey on foot over Japan holding propaganda meetings in many places. —Revuo Orienta.

S-ro Seisin Hirajama, Siba Parko, Tokio, president of the Japanese Red Cross, also of the Japanese Society for Expositions, has of late evinced much interest in Esperanto. It is requested that information concerning relations of Esperanto and the Red Cross in the various nations be sent to him. Revuo Orienta

The XIIth International Congress of Stenography held at Strassburg, August 12, decided to accept the use of Esperanto in its future international conventions.

An Esperanto department has been opened in the Polish monthly, "Poster," 1708 E. Baltimore St., Baltimore, Md. We note a poetical translation of "Espero" in the October number.

Digitized by Google

At the first meeting, Sept. 24, of the new sindicalist club, "Antaŭen," in Lisbon, which opened a course in Esperanto a force of policemen arrested the students and locked them up in jail for two days on the charge of meeting behind closed doors. Worse yet, two of the policemen were Esperantists. [We sincerely hope the martyrs were permitted to study during their captivity] —Laboro

Hungara Esperantisto reports the chief progress there is among labor circles.

Esperanto Finnlando for October has a very interesting account of athletics in Finnland and at Antwerp, also a valuable inquiry into Esperanto among the workingmen of every land.

Verda Utopio, 5256, Uehommaĉi 7-ĉome, Minamu-ku, Osaka, Japonujo, (3 yen) is a new illustrated monthly full of translations from the best literature of Niphon.

60 delegates from some 17 nations met at the general congress of the Christian Internationalists, July 21 to 29, at Bilthoven, Holland. It was at first planned to use three languages, French, English, and German, but as this proved impracticable Esperanto was adopted for the official language and from the time of that decision, the minutes were sent to the delegates in Esperanto. In the coming convention in Jan., 1921, Esperanto is to be the sole language for translations.
Franca Esp.

Kronstadt, Russia, has a group of 100 students of Esperanto (July 14, 1920). There is an Esperantist regiment in the Red Army in Siberia. —special letter to E. Laboristo.

—At the 5th national congress of Italian Esperantists, Oct. 3—5, "I was the representative from my city....There were present representatives from nearly every department of the national government, besides many persons of eminence....From what I heard and saw at the congress, I believe that the triumph of Esperanto in Italy is rapidly approaching."

—from a letter from Italy, G. P. F.

In Germany, thru the efforts of the German Esperanto Association, the governments of Saxony, Brunswick and Hesse have sent circulars to all the schools in their respective jurisdictions, making inquiry concerning the results of the teaching of Esperanto. The circular recommends, that as far as possible during the present year, Esperanto be taught in all the schools, the results noted, and at the close of the year be reported to the government.

At present, in each of the Saxony cities of Plaŭen and Dresden, Esperanto is being taught to about 300 pupils. In other places in Saxony, it is being taught to less numbers. As good results have been noted in all the schools of Germany, where Esperanto has already been taught, it is safe to predict that the present movement will greatly hasten the time when Esperanto will be taught in all the schools of Germany. —G. P. Feree

[We are happy to chronicle also the joyful result of this action. The Minister of Instruction for the State of Hesse, W. Germany, has OFFICIALLY asked all school directors to institute voluntary courses in Esperanto among their scholars.]

Digitized by Google

## OFFICE OBSERVATIONS

Send all mail, book orders or other association business to The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Those who want to take part in the joys of a congress even vicariously will do well to purchase one of the "Gvidlibroj al Hago," finely illustrated and printed all in Esperanto, 15 cents at The Esperanto Office.

## RECENZA FAKO

**Maximo, "Terrues"**—This book of 279 pages in Spanish by an enthusiastic samideano gives the story, perhaps an autobiography, of one Maximo Escobar in factories, prisons, and political movements in Mexico, in New York, and English Esperanto circles, and in Barcelona. Here he is welcomed by Ferrer and employed as a teacher until the suppression of Ferrerism following upon the bomb outrage just before the 5th Esperanto Congress. Esperanto is always of value; when, on returning to Mexico, he found his wife dead, he even hopes for an international marriage with an English samideanino, but when the story ends, he is in Mexico crying "Vivu Madero!" The book is, then, a testimonial of the large part Esperanto can play in a person's life. Obtainable at Apt. 5212, Mexico, D. F., Mexico.

**La Parolado de A. Salandra pri Itala Milito**—This speech of June 2, 1915, translated and published by the Esperantists of Padova, has just reached us sent by "La Tipografica," S. Vito al Tagliamento. It is one of the war documents, and explains Italy's entrance into the world war. Printed in good Esperanto, price not shown.

### DEZIRAS KORESPONDI

**One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.**

**Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.**

S-ro H. Hawker, juveluisto, 63 Bevington Rd., Aston, Birmingham, Anglujo, ŝatus kor. kun Amerikaj juvelistoj.

Raoul Halewych, 32 rue de l' ourthe, Bruscelles, Belgique, deziras interŝanĝi p.m. kaj p.k. Korespondos angle, france, esperante aŭ holande. 8

S-ro Giovanni Bochicchio, Vico Cardasco 6, Potenza, Italy, deziras korespondi per il.p.k.

Armand B. Coigne, 193rd Street and Creston Avenue, New York, Usono. Deziras koni personojn interesatajn en int. asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Ne korespondos pri psikismo nek ia temo escepte la asocion, kaj NE RESPONDOS al PK kaj PM kolektantoj.

Shanghai, China, 35 Broadway East, junulo deziras korespondadi precipe letere aŭ P. K. pri diversaj temoj. Interŝ. per P. K. kaj P. M. Ĉiam kaj al ĉiuj respondas.

S-ro Fr. Pilny, Husova 187, Jiĉin, Ĉehoslovakio.

S-ro O. Armas Pullinen, Helsinki, Johanneksentie 8, interŝanĝas P. M., utilosendajn. Suomio, Finnlando.

S-ro N. Rudnicki. U. E. A. no. 7149, Taŝkent, Centra Azio, renove korespondadas, tuj respondos.

Filatelistoj! Sendu al mi por provosendo 5 aŭ pli dolaroin kaj vi ricevos P. M. de novaj ŝtatoj. Sendu vian mankliston! Sin turnu al del. U. E. A. S-ro J. Kaplan, Leepaja, (Libaŭ), Juhras eela 20, Letonio.

S-ro K. Manojloviĉ, Kukoviĉ 20, Zagreb, Krayevstvo S. H. S., Jugoslavio

F-ino J. Manojloviĉ, Kukoviĉ 20, Zagreb, Krajevstvo S. H. S., Jugoslavio.

S-ro Bruno Colivicchi, Volaterra, Italio, P. M., I. P. K.

S-ro Hideo Jagi, Dai 3 Kotogakko, Kioto, Japanujo, deziras korespondi per I. P. K. kun ĉiulandanoj.

Filatelistoj—Sendu al mi per rekomendita letero 100—500 P. M. de via lando (eĉ pli multe de unu speco) mi sendos tuj al vi la saman valoron de Ĉehoslovakio. Solida agado garantiita—Aldonu resp. k. S-ro Jos. Pŭmr, instruisto, Hradec Kralove II, Ĉehoslovakio

S-ro Inocene Gross, Houŝkova 32.1, Plzen, Ĉehoslovakio.

S-ro Jonas K. Miliauskos, Dideve Vilniaus G-ve, No. 34, Kaunas, Lithuania, Europe.

Digitized by Google

# THE METROPOLITAN ESPERANTO CLUB

During the last two years our Esperanto papers have been telling us of the universal revival of interest in the "world language" question. We knew that Esperanto was making rapid progress in Europe; that it had gained the recognition of labor bodies in France, Portugal, Germany, Brazil and elsewhere, and that men like Arthur Henderson, the British labor leader, and Joseph McCabe, the translator of Haeckel, were "with us," ———

But when the news came to this country that Soviet Russia had officially recognized and adopted Esperanto; when we learned that Barbusse, the great author of "Light," and Rolland, creator of the immortal "Jean-Christophe," were Esperantists, **we began to realize that Esperanto was achieving stupendous victories in the proletarian movement.**

**There has never been a better time than the present for the advancement of our cause.** The Metropolitan Esperanto Club is a radical organization, founded for the purpose of spreading a knowledge of Esperanto among those who have the greatest need of an international language — the radicals and internationalists.

THE METROPOLITAN ESPERANTO CLUB,
138 West Thirteenth Street, New York City.

If you are a Single Taxer, a Socialist, a Communist, a member of the Industrial Workers of the World, or an independent thinker, looking forward to a better and a finer world, this is YOUR organization. We welcome your support and your cooperation in our work. Any person who is in sympathy with our purposes may become a member of the Club. The annual fee is $6, payable in advance, or 50 cts. a month if you join the New York local and live near enough to pay your dues monthly.

**When in town, telephone Bryant 970 or Shore Road 4328. Tell your New York friends that the Rand Book Store (connected with the Rand School for Social Science), 7 East 15th Street, carries a complete stock of Esperanto books.**

**Adv't.**


Digitized by Google